



Aŭtoro de Esperanto
Dro L. L. Zamenhof
(1859—1917)

Graturno de Reto Rosetti

Redaktoro kaj
responda eldonanto:
Lucien BOURGOIS
25 rue Gambetta
62950 NOYELLES-GODAULT
(Tel.20.23.32)

Ricevas ĉiuj aktivaj
UFE-membroj en la
Federacia teritorio
kaj la pagintoj de
jenaj kotizoj:
15F : Aktivaj Membroj
10F : Membro-Abonantoj
5F : Junuloj aŭ Pensiuloj

Pagendaj al:
Federation Esperantiste
du Nord de la France
17 rue des Bouvreuils,
62000 ARRAS
per poŝta ĝiro:
LILLE n-ro 517.15
aŭ per banka ĉeko
rekte al la kasisto:
Fernand DITACROUTE
10 rue G.Chapdeville
Boulazac,
24000 PERIGUEUX

Mondonacoj por la
PROPAGANDO-FONDUSO
estas dankeme akceptataj
dum la tuta jaro.



Dumonata Bulteno
de la
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

NORDA GAZETO

Informilo n-roj 3 kaj 4
(aŭ n-ro 260, 35-a jaro!

Majo-junio-julio-
aŭgusto 1975

Pri tio, vidu ĉi suban artikolon.)

SUKCESA MARKOLA KONGRESO

Ĉeestis 70. Sabate, 3-an de Majo, posttagmeze, okazis ekskurso per aŭtoĉaro al Saint-Omer. Tie, ni vizitis la muzeon, kiu entenas dokumentojn rilate la unuan Universalan Kongreson de Esperanto (1905), el la kolekto de pioniro en nia movado: S-ro DELIGNY. Ankaŭ ni vizitis la katedralon, la plej belan en Norda Francujo, post tiu de Amiens.

Post vespermanĝo en Bulonjo, okazis la distra vespero. Nia talenta artisto, Hervé GONIN, prezentis skeĉojn kaj ludis gitaron. Ĉiuj multe ridis kaj li rikoltis tondran aplaŭdadon. Je la 23-a kaj duono finiĝis tiu sukcesa memorinda prezentado.

La morgaŭan matenon, je la 9-a, S-to BOURDON celebris kantitan meson en Esperanto ĉe la preĝejo S-ta Petro. Dume, la ceteraj kongresanoj vizitis la havenon.

Je la 11-a okazis la ĝenerala kunveno de N.F.E.F.

Je la 12-a kaj duono, la reprezentanto de la urbestro, S-ro WIBRECH, kun alia magistratano, S-ro LINE, oficiale akceptis la kongresanojn en la urbo-domo.

La vicurbestro memorigis pri la 1-a Universalaj Kongreso de Esperanto, okazinta en Bulonjo en 1905.

Poste respondis la federacia Prezidanto, S-ro ODENT, la franca reprezentanto de Markolaj Kongresoj, Jacques DOYELLE, lia angla homologo, John RAPLEY, kaj delegitoj el Belgujo, Germanujo, Japanujo, Nederlando kaj Novzelando. Rolis kiel interpretisto Lucien BOURGOIS.

Post la komuna tagmanĝo, kiu arigis la kongresanojn en gaja etoso, parto el ili devis jam forveturi, sed la plej multo el la gesamideanoj arigiĝis ĉe Placo Zamenhof, apud la stacidomo Tintelleries, por deponi florgarbon sur la memorplaton tie starigitan en 1931 honore al la kreinto de Esperanto.

Menciinde, ke krom la reprezentanto de la urba magistrato, S-ro LINE, S-to WAROT, kiu celebris la meson esperantlingve dum la dua Markola Kongreso, honoris nin per sia ĉeesto.

Ni direktas nian sinceran dankon kaj varman gratulon al la organizintoj: S-ro Jacques DOYELLE, Ges-roj RAPLEY, F-ino BAIRE, kaj neforgesante Hervé GONIN, kiu per siaj humoraĵoj distris nin.

Menciinde, ke F-ino TRIOLLE aranĝis belan E-ekspozicion, malfermitan al la neesperantista publiko. Lucien BOURGOIS

OFICIALA MESAĜO

Post la fino de la kongreso estis sendita jena mesaĝo al la Prezidento de la France Respubliko :

A Monsieur le Président de la République,
Palais de l'Élysée,
PARIS

Boulogne-sur-Mer, le 4 mai 1975

CONGRES DU DETROIT BOULOGNE SUR MER. PARTICIPANTS DE SEPT NATIONALITES VOUS ADRESSENT LEUR TEMOIGNAGE PARFAITE CONVENANCE LANGUE ESPERANTO DANS RELATIONS INTERNATIONALES. DEMANDENT GOUVERNEMENT FRANCAIS FAVORISER SON ENSEIGNEMENT.

(MARKOLA KONGRESO BULONJO ĈE MARO. PARTOPRENANTOJ EL SEP NACIOJ ATESTAS AL VI PERFEKTAN TAŬGECON LINGVO ESPERANTO EN INTERNACIAJ RILATOJ. PETAS FRANCAN REGISTARON AKCELI ĜIAN INSTRUADON.)

Al tiu alsendo respondis S-ro CAMUS, Teknika konsilanto ĉe la Prezidentejo, per letero en kiu li agnoskas ricevon de la mesaĝo, dankas, kaj indikas, ke li atentigos la Ministron de Edukado pri la enhavo.

POROKAZA POEMO Robert GENDRE verkis franclingvan poemon pri D-ro ZAMENHOF, okaze de la 70-a datreveno de l'Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo

PROKOKOLO PRI LA LABORKUNSIDO DE N.F.E.F.

- * La Prezidanto, Georges ODENT, malfermis la kunsidon kaj legis leteron de Ignaco FLACZYNSKI, kiu klarigas, ke li ne plu povas funkcii kiel Ĝenerala Sekretario.
- * La preparitan agadraporton por la jaro 1974 kaj la unuaj monatoj de 1975 komentis Lucien GILOTEAUX:
- Operacio "Nikolao KOPERNIKO en la okuloj de la infanoj tutmondaj".
 - Filmo "Le Mage de Torun".
 - 16-an de Marto : ekspozicioj en LILLERS kun debato en meza lernejo (ĉeestis 70 geknaboj 14-jaraj kaj kunlaboris F-ino VARLET, profesoro pri franca lingvo).
 - De la 9-a ĝis la 18-a de Marto : ekspozicio pri KOPERNIKO en la Muzeo de BETHUNE.
 - De la 14-a ĝis la 16-a de Aprilo : Ekspozicio kun la "Club Européen" en BRUAY-en-ARTOIS.
 - 21-an de Marto : Ekspozicio en la urbodomo de ARRAS.
 - 21-an de Majo : Esperanta angulo okaze de la filatela ekspozicio en la urbodomo de LIEVIN.
 - 15-16-an de Junio: Ekspozicio okaze de lerneja festo en HOUDAIN (Lernejoj Elby kaj Langevin).
 - De la 4-a ĝis la 6-a de Oktobro en LILLERS : Ekspozicio "Mia ministra vivo", kaj prelego de I. FLACZYNSKI al la lernejanoj, "Kial mi, ministro, lernis kaj daŭre lernas Esperanton".
 - Sine de la Asocio "France-Pologne" estis kreita klubo "Per Esperanto al Pollando".
 - Estis lanĉita la konkurso "Francio en la okuloj de Poloj". El la 400 respondintoj, 50 skribis en Esperanto.
 - 13-an de Marto, en Teknika Lernejo de Bruay-en-Artois : Ekspozicio pri Pollando kaj Esperanto.
 - 9-an de Aprilo 1975 en ARRAS : Ekspozicio kaj debato.
 - 12-an de Aprilo 1975 : Esperanta aŭtomobilo partoprenis la festan viciradon tra ARRAS.
 - 28-an de Aprilo, en BRUAY : renkontiĝo kun Jean-Paul SARTRE. Li ne sciis, ke unu el liaj verkoj estis tradukita en Esperanto.
 - Alvoko al la tutmonda esperantistaro, por ke ĝi sendu salutkartojn al la urbestro de BULONJO, okaze de la 70-a datreveno de la unua U.K. (N.D.L.R.: la vicurbestro sciigis, ke multaj Poloj skribis.)
- N.B. : Por kompletigi ĉi tiun raporton, la redaktoro invitas ĉiujn grupojn kaj unuopulojn sciigi lin pri siaj aktivaĵoj sur Esperanto-kampo dum jaro 1974. (E-kursoj, grupkunvenoj, ĝemelrilatoj, partopreno al kongresoj, ktp.) Bonvolu sendi al Lucien BOURGOIS.
- * Poste, Lucien BOURGOIS legis la finanĉan raporton senditan de la kasisto, Fernand DITACROUTE. Temas pri la federaciaj spezoj inter la

1-a de januaro kaj la 31-a de decembro 1974 :

ENSPEZOJ

- Kotizoj enspezitaj por 1973	237 50
- " " 1974	835 00
- " " 1975	60 00
	<hr/>
	1132 50
- Diversaj donacoj	1546 00
- Vendado de libroj, insignoj, ktp.	387 50
- Subvencio de departemento Nord	600 00
- " " " Pas-de-Calais	300 00
	<hr/>
	3966 00
	<hr/> <hr/>

Sume : 3966 00

ĈU VI PAGIS
VIAN KOTIZON
POR 1975 ?

ELSPEZOJ

- Funkciado	428 75
- Norda Gazeto	866 64
- Aĉetoj	572 00
- Ekspozicioj	134 95
	<hr/>
	2002 34
	<hr/> <hr/>

Sume : 2002 34

La stato de niaj financoj estas kontentiga dank' al du malavaraj donacoj anonimaj (1000F kaj 500F). Sekvinda ekzemplo!

Aliparte, la fakto ke en 1974 estis eldonitaj nur kvar bultenoj (pro la poŝtaj strikoj) malaltigis la elspezojn.

* Elektado de komitatanoj :

Ni renovigis la trionon de la federacia komitato. Finis sian mandaton kaj rekandidatiĝis: Guy AUGUEZ, Lucien BOURGOIS, F-ino MAUCHIEN kaj S-ino VAN PARYS. S-ro BUERICK rezignis pro sia aĝo. Sekve, Pastro BOURDON kandidatiĝis por lin anstataŭi. Neniu alia proponis sin. La kvin kandidatoj estis unuanime elektitaj per 17 voĉoj.

* Salutis la kongreson kaj senkulpigis : S-roj FLACZYNSKI, DITA-CROUTE, AUGUEZ, BOULOGNE, BUERICK, PHILIPPE, MARMENOUT, DUCROCQ, Ges-roj CURNELLE, Ges-roj PLUTNIAK.

* Je la 12-a la prezidanto deklaris la laborkunsido fermita.

Ni ne disponis sufiĉe da tempo por pritrakti la lokon de la proksima federacia renkontiĝo. Proponojn sendu al la Federacia sidejo. Antaŭdankon!

Aldono al tiu agadraporto :

Grupo de Valenciennes : Jara agadraporto :

Antaŭ ol priskribi al aktivaĵojn de la kultura Esperanto-grupo, ni memorigu, ke kvankam oficiale deklarita ĉe la Vicprefektejo de Valenciennes nur la 9-an de januaro 1933, tiu grupo fakte ekfaris siajn unuajn paŝojn en 1907.

Kompreneble, same kiel ĉiu asocio, ĝi spertis sortoŝanĝojn. Ne mankis kaj ankoraŭ ne mankas la malfacilaĵoj, sed la fakto, ke la grupo ekzistas plu, jam konsistigas motivon de kontenteco.

1973-74, kiel vivis la grupo dum tiu periodo?

Tutunue, ni elektis novan Prezidanton, ĉar François CANONNE emeritiĝis kaj, preferante la varman sunon de Suda Francujo al la nebuleca ĉielo de Norda Francujo, li forlasis nian regionon.

Por ni, tio ĉi signifas gravan perdon, ĉar li agadis sine de nia Esperanto-Movado ekde – ni diru – la oficiala fondiĝo de nia grupo.

Ĉi tie liaj kontribuaj estis multegaj. Ĉiam S-ro CANONNE estis disponebla, kiam oni petis de li gvidi kurson, debaton, partopreni kunvenon aŭ respondeci ion. Pro lia kapableco rilate Esperanton, tute nature oni turnis sin al li, kiam prezentiĝis traduka malfacilaĵo. Lia fideleco estis neŝancelebla kaj li volonte memorigis, ke por kelka tempo li estis Prezidanto, Sekretario, Kasisto kaj membraro de la grupo. Malkuraĝiĝo neniam trafis lin, kaj ni povas aserti, ke se hodiaŭ nia grupo ankoraŭ ekzistas, ĉefe al li ni ŝuldas tion.

S-ro Roger LIETARD anstataŭis lin. Ni ja estas certaj, ke pro tiu elekto nia grupo troviĝas en la tute ĝusta mano. Ekde la mallonga tempo, dum li plenumis la ĉefan respondecon, nome la funkcion de Prezidanto, li jam grave agadis por nia grupo. Pro tio, ni sincere dankas lin.

Niaj ĉefaj aktivaj estas jenaj : ni regule kunvenas ĉiumonate, la 2-an dimanĉon, en salono de la Urbodomo.

Ni lanĉis sufiĉe gravan gazetaran kampanjon. Sekve aperis tre longa artikolo kaj artikoletoj, krom regulaj raportoj pri niaj kunvenoj kaj niaj ĝemelrilatoj kun niaj esperantistaj ĝeamikoj el DUREN.

Ankaŭ menciinda la bonega laboro farita sine de nia skipo por la verkado de grava dokumento celanta informi pri Esperanto kaj nia grupo. Ĉefe al S-ro PETIT ni ŝuldas tion. Tiu dokumento estas havebla por tiuj, kiuj deziras ĝin kaj niaj membroj uzas ĝin por propagandi.

Nia grupo partoprenis la kongreson de Méricourt, la 10-an de Marto 1974. Menciinde la multnombra partopreno de niaj grupanoj. Pri tiu tago, ni konservis bonegan memoron.

Junulino el nia grupo pasigis agrablajn feriojn en Brésillon.

Nun, ni transiru al tio, kio povas esti konsiderata kiel la supro de nia Esperanta jaro, nome : nia renkonto kun niaj esperantistaj ĝeamikoj el DUREN. Ĝi estis la 15-a renkontiĝo, kadre de la ĝemeliĝo de niaj du urboj.

Sabate 1-an de Junio okazis akcepto en la urbodomo, sub prezidado de S-ro Olivier MARLIERE, kiu faris al ni la honoron kaj agrablan surprizon eldiri sian paroladeton en Esperanto.

Kiel kutime, niaj ĝeamikoj estis dispartigitaj en la hejmojn de la lokaj esperantistoj por tie pasigi la vesperon kaj tranokti.

Dimanĉe 2-an de Junio, ĉiuj ekskursis al Compiègne, partoprenis komunan manĝon en restoracio de la Arbaro, vizitis de Kastelon de Compiègne kaj

la aŭtomobilan muzeon.

Lunde 3-an de Junio, ĵus refreŝiĝinte post la laciga ekskurso, ree ni ekveturis por viziti la Regionan Naturan Parkon de St-Amand, akompanate de lertega gvidisto : ĝia Direktoro, S-ro MINAIR.

La urbeŝtraro akceptis la ĝemelurbajn esperantistojn en la salonoj de la "Grand Hôtel". Lasta komuna manĝo ebligis vige konversacii pri la plej diversaj temoj, antaŭ la tradicia akompanado ĝis la landlimo.

Pri tiu 15-a renkontiĝo ni konklude diru, ke ĝi nur konfirmas tion, kion ni jam sciis, nome : "Esperanto estas ne nur mirinda ilo kiel internacia lingvo, sed krome, la idealo de homara interfratiĝo, kiun ĝia kreinto celis, povas esprimiĝi trans la lingvaj baroj.

Krom la ĉi-supre prezentitaj aktivaĵoj ni menciuj, ke en la porknabina lernejo de "la Plaine de-Mons", dank'al la afabla permeso de la lernejestrino, S-ino Poteau, F-ino DURY gvidis kurson ĉiusabate, de la 14-a ĝis la 15-a kaj duono.

Ni memorigu, ke la grupo aranĝas perkorespondajn kursojn.

Por fini tiun raporton, ni menciuj la lastan prelegon de S-ro CANONNE antaŭ la lernantoj de I.U.T. de Valenciennes.

La Prezidanto, R. LIETARD La Sekretario, J. DIETRICH

UFE - KOMITATO

Ni prave fieras anonci al vi, ke dum la lasta balotado, kvin membroj de NFEF estis elektitaj kiel komitatanoj de la nacia E-Asocio, nome: F-ino R. TRIOLLE, S-roj Marcel DELCOURT, Hervé GONIN, Daniel LUEZ kaj J. L. TORTEL.

Krome, Hervé GONIN iĝis Prezidanto de UFE.

Al la elektitoj NFEF direktas sian varman gratulon!

LERNEJAJ DEBATOJ

En la francaj duagrada lernejoj okazas pli malpli regule debatoj, kies temon rajtas proponi la lernantoj. En la liceo de CROIX, apud ROUBAIX, gelernantoj preparis plej diversajn paroladetojn kaj diskutojn dum la lernjaro 1974/75.

Dum franclingva kurso, du lernantinoj parolis pri Esperanto, montris gazetojn kaj respondis demandojn de la samklasanoj kaj de la instruisto. Sekvinda ekzemplo!

KANTO La brita korespondanto de la revuo ELAN petis kaj ricevis
 TRADUKITA esperantlingvan tradukon de la kanto "La Internacio de la
 Paco". La tekston elfrancigis M. DELCOURT.

HISTORIO DE "NORDA GAZETO"

(fino)

Dum la okupacio, la grupo de Lille eldonis kaŝe du numerojn de mult-obligita bulteno, kies titolo estis "Inter ni". Tuj post la liberiĝo, la nordaj samideanoj sentis urĝan bezonon sin rekontakti. La numeroj 3 kaj 4 aperis kun subtitolo: "Bulteno kun varia aperdato eldonata laŭ la okazaj rimedoj". Zorge stencilita sur aĉa papero. Mankis papero kaj multo alia, sed en la koro de kelkaj kuraĝuloj malmankis entuziasmo. Artikolojn varme instigantajn al revigliĝo, relaborado, subskribis ĉefe: Volqueman (Civitano), Gilman (Korpoeto), F-ino Gallet (Pezetas) – ŝi estis kasistino kaj enspezis la kotizojn –, Mathyn (Veksonorilo), k.a., kiuj jam ne plu bezonis uzi pseŭdonimon. Pro la cirkonstancoj, regula abonado ne ekzistis, malavara mondonaco estis registrita kiel "honora abono", la numeroj estis venditaj poekzemplere.

Mi tenas en mano la n-ron 4 de "Inter ni", datitan "Sept-okt.1944"; ĝi konsistas el 15 paĝoj : kroniko de la renaskiĝantaj grupoj, literaturaĵoj, poezioj kaj bonaj tradukoj. La numero 5 aperis presita kun subtitolo "Triurba Esperanto-Bulteno Lille-Roubaix-Tourcoing"; ĝi konsistas el 4 paĝoj plus 5 stencilitaj literaturaj paĝoj suplemente.

Ĉu "Inter ni" plu vivis post la 5a numero? Mi ne scias. Ĉu la Bulteno de Nordfranca Federacio, kies unua numero aperis stencilita en junio 1946, aperadis regule ĝis la numero de julio-aŭgusto 1957, mi ne povas precizigi, sed dum tiu periodo la nomoj de P. Brunet kaj R. Curnelle estas rememorindaj, ĉar ambaŭ daŭre enblovis per siaj multobligitaj informiloj interligan spiriton en la nordan federacion.

Post tiu parentezo, la historio de "Norda Gazeto" rekomenciĝas kun la numero de septembro 1957 de la federacia bulteno al kiu Curnelle redonis la malnovan titolon.

La ankoraŭ stencilita bulteno, ĉiam riĉa pro informoj el la vasta esperanta mondo, aperis jam la sekvan monaton per presita titolo. De septembro 1957 ĝis fine de 1959 aperis 28 numeroj po 4 paĝoj.

En 1959, dum la 51-a nacia kongreso en Tours, estis proponate ke la federaciaj bultenoj kunfandiĝu kun "Franca Esperantisto". La Norda Federacio decidis, ke la regionaj aktivaĵoj aperos en la nacia organo, sed en majo 1960, S-ro Lucien Bourgois, elektita kiel nova sekretario de la federacio, klarigis kial "Norda Gazeto" ne devas malaperi; kial, eĉ se de nun la bulteno fariĝos dumonata, ĝi devas daŭrigi sian mision kaj pro tio li akceptis la respondecon pri ĝia redaktado, kiun taskon nia amiko daŭre plenumas bonege de 15 jaroj.

Regule, la bulteno aperadis ĉiudumonate po 6 paĝoj ĝis la numero 2 de marto-aprilo 1963, kiam finiĝis la periodo de "stencileco"; do de la komenco de 1960, ĝis tiu dato aldoniĝis pliaj 21 numeroj.

La de tiam ofsetita "N.G." havis belan aspekton. Ĉar prizorgis la presadon samideano Delaire en Orléans, tute mankis preseraroj. La paĝonombro estis variebla laŭ la okazaĵoj, sed la enhavo daŭre estis interesa. Ekde 1968, transprenis 'presadon' angla firmao. (Tiu atingas ofsetan kvaliton denove per stenciloj!) La formato 21x27 estis ankoraŭ tia kia en periodo de antaŭa stencileco. Ekde majo-junio 1969, nova ŝanĝo, nova plibonigo : la formato reduktiĝis al 18x22, sed jam temis pri agrafitaj kajeretoj kaj ne plu simplaj folioj.

La periodo de majo 1963 ĝis la numero de marto-aprilo lasta aldonas la nombron de pliaj 67 numeroj. Jen kial ĉi tiu numero rajtas subtitoliĝi N-o 260 - 35-a jaro!

Longe pluvivu "Norda Gazeto"!

Marcel DELCOURT

Alvoko al la legantoj :

Por kompletigi la kolekton de ĉiuj aperintaj numeroj de "Nordfranca Esperantisto", mankas la n-roj 6 (aprilo), 7 (majo) kaj 9-10 (julio-aŭgusto) de la jaro 1939. Kiu povas helpi? Multan antaŭan dankon!

PRI LA KONGRESO DE U.F.E. EN TOURS

El la tre bone organizita kongreso, UFEanoj revenis ege kontentaj pro la interna amikeca etoso de la debatoj, kaj de la flankaj okazaĵoj, fine pro la elekto de juna prezidanto... Hervé GONIN, jam konata kiel redaktoro de "Franca Esperantisto" kaj talenta prezentanto de varieteaj kaj kabaretaj spektakloj esperantistaj... ankaŭ kiel filo de esperantisto el LYON.

Ankaŭ nepre menciinda estas la oficiala inaŭguro de strato Zamenhof en nova moderna Tours-kvartalo, sabate 30an de marto matene, en atmosfero griza kaj neĝa... vere pola akcentis multaj.

Spite al la malvarmo, Prof. Waringhien, alte staranta sur mallarĝa podio, kune kun vic-urbestro, senvualigis la strat-ŝildon je la nomo de D-ro Zamenhof, kaj eldiris kelkajn vortojn. Pro la malbela vetero, la ĉeestantoj estis invititaj plilongigi la ceremonion interne de la belega urbodomo, kie honorvino kaj kuketoj atendis ilin... ankaŭ aliaj paroladetoj.

Inter la partoprenantoj troviĝis kelkaj alilandaj geesperantistoj, i.a. D-ro DENOEL, UEA-Represntanto.

La distra vespero, viglita de turanĝia folkloro grupo, la kongresbankedo en rok-kelo de Vouvray-Rochecorbon, la ekumena Diservo tute en Esperanto, la lunda tuttaga ekskurso ekster la kutimaj turismaj vojoj, tra la ĉarma Turanĝio kaj ĝiaj vidindaĵoj, elmontris la perfektecon de plurmonata organizado fare de la L.K.K. (Okcident-Federacia bulteno)

RADIO Vatikana

La aprila bulteno de la Vatikana Radio publikigis leteron de esperantisto, proponantan radiajn elsendojn en la internacia lingvo.

Tiun aperigon oni konsideras signifoplena ĉar verŝajne per ĝi la Vatikana Radio volas sondi la terenon por ekscii ĉu estas konsilinde aldoni Esperanton al la longa listo de la ĝis nun uzataj lingvoj.

Do, se – kiel oni fidas – sufiĉe multaj esperantistoj tra la mondo reeĥos je tiu letero, subtenante la en ĝi faritan proponon, la dezirata ebleco povos konkretiĝi.

Se vi volas kunhelpi tiucele, skribu nacilingve al
RADIOVATICANA, Città del Vaticano.

ĈEESTU LA 3-an ZELANDAN RENKONTIĜON!

Je sabato, la 20-a de septembro 1975 en DOMBURG (sur la duon-insulo WALCHEREN, Nederlando).

Rendevuejo : Gemenschapshuis, Kanonweistraat.

El la programo :

- mallonga prelego de Jo Haazen (el Antverpeno).
- promeno laŭlonge de la marbordo.

Detaloj: Ni akceptos la partoprenantojn inter la 10-a kaj la 11-a horo. Fermo proksimume je la 17-a horo. Simplaj manĝoj haveblaj en la kunvenejo (bonvolu antaŭmendu). Por tiuj, kiuj deziras resti ĝis dimanĉo, ni eventuale aranĝos viziton al la interesa urbo Middelburg. Tranoktadon ni povos prizorgi nur se vi sufiĉe frue anonciĝos!

Pliajn sciigojn volonte donos:

Ben kaj Rie Weber, Veerse Singel 37, NL3500 MIDDELBURG (Nederlando) (tel. n-ro 1180. 26438)

NASKIĜO

Ges-roj Jean-Marie BOURGOIS havas la ĝojon sciigi al vi pri la naskiĝo de sia filino LINDA, la 13-an de majo.

(Adreso: 31 rue Gambetta, 62950 Noyelles-Godault.)

ESPERANTO ĈE Post tiuj en Clermont-Ferrand, Aix-en-Provence kaj
UNIVERSITATO Pau, nova E-kurso malfermiĝis ĉe I.N.S.A. (Institut
National des Sciences Appliquées) en Rennes.

Instruas M. MARTIN, agregaciito pri angla lingvo. ("La Informilo")

"TEILHARD, Jen la titolo de artikolo de J. LEROY (NORD ECLAIR,
20 JAROJN POSTE" 30-an de Marto). Samokaze, la aŭtoro intervjuis
G. H. BAUDRY.

NIA VIVO

Valenciennes : La 16-an de Februaro 1975 okazis la jara ĝenerala kunveno de la loka E-grupo. Tri ĵurnaloj : la Voix du Nord, Nord-Matin kaj Liberté raportis pri tio. La Voix du Nord menciis, ke F-ino BARRET, iama Prezidantino de la E-grupo de Valenciennes, partoprenis la unuan U.K. en Bulonjo.

13 membroj de la grupo veturos al DUREN por renkonti siajn germanajn geamikojn. Ili restados tie de la 17-a ĝis la 19-a de Majo.

Pri kurso, bedaŭrinde, ni ne povis pro malfrua respondo (cetere ĝis nun ne ankoraŭ alveninta) de la Akademia Inspektoro malfermi kiel kutime nian kurson en la Lernejo de la "Plaine de Mons".

Tamen, 3 junulinoj lernas kune, kaj J. DIETRICH instruas al S-ino DURANDEAU, estrino de la "C.E.S. Eisen".

Sur alia kampo, ni projekciis tri filmojn en Esperanto (pri Aŭstralio, Nov-Zelando kaj FIAT) ĉe la Kultura Centro Fénelon en Beuvrages, la 21-an de Februaro

La grupanoj regule kunvenas po tri fojoj ĉiumonate, nome : la 1-an kaj 3-an vendredojn en kunvenejo afable kaj senpage disponigita de valencienna advokato, kaj la 2-an dimanĉon en salono de la urbodomo.

Ni sendis al pluraj lernejestroj la dokumenton, kiun ni mencias en nia jara raporto. Dank' al ĝi, ni varbis S-inon DURANDEAU.

J. DIETRICH

NEKROLOGO

Kun bedaŭro ni eksciis pri la morto de angla partopreninto de la Markolaj Kongresoj, S-ro Gifford FOWLER. Al liaj geamikoj, i.a. Ges-roj Julien DUCROCQ kaj S-ino CHEVERRY, NFEF direktas sian sinceran kondolencon.

Jen soneto, verkita de Julien DUCROCQ, memore al sia amiko :

SONETO PRI NIA ANGLA AMIKO

Antaŭ dudek-tri jaroj, iu sinjoro brita
Venis en nian urbon, iĝis nia amiko
Ĉiu letero lia – aŭ nia – estis briko
Por nia amikeco. Jara vojaĝo, rita,

Certe plifortigis ĝin. Li estis ĉiam sprita,
Bonkora, diligenta kiel eta formiko.
Bone instruis al mi regulojn de l' metriko,
Kaj estis por ni io kiel patro spirita.

Dank' al li ni vizitis parton de Albiono;
Al li iĝis konata la norda regiono
De lia dua lando. Tiu amiko ora

Neniam plu revenos, por pasigi la feston
De Pasko kun ni ĉiuj! Forte lian foreston,
Kaj plore, ni bedaŭros en etoso memora!

Juliano

27-an de Marto 1975